

LA NORDAMERIKA

# Esperanto- Revuo



**Esperanto kaj  
Morsa kodo**

**La prezidanta  
raporto al  
la kongreso**

**Juna Esperantistino**

**JULIO • 1963**

# NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

vol.11, no.5

808 Stewart St., Meadville, Pa.

Published monthly except February by the Esperanto League for North America, Inc.  
Application to mail at second-class postage rates is pending at Meadville, Pennsylvania

**La Nordamerikan-Esperanto-Revuon** (fonditan en 1953) eldonas la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, landasocio de la Universala Esperanto-Asocio kaj partoprenanto en la programo "Popoloj-al-Popoloj."

**Kotizoj:** abono kostas \$3.00, donacabono kostas \$2.75 (tri por \$5.00). Membrecostoj: simpla kostas \$5.00, kaj inkluzivas abonon. Aliaj kategorioj de membreco estas: subtenanta, \$10.00; patrona, \$20.00; viva, \$100.00; kombinita membreco por geedzoj, \$7.00. Studenta membreco, \$3.00.

**Adreso:** ĉion por la Ligo, informpetojn, kotizojn, kc., sendu al la Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Komunikojn por la Revuo, sendu al la redaktoro ĉe la adreso de la Revuo.

**Oficistoj de E.L.N.A.:** Prezidanto, David Richardson, R.F.D. Box 81, Eastsound, Washington. Vicprezidanto, Charles Peterson, 8314 E. Florence, Downey, California. Sekretario, Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Kasisto, John Futran, 601 West 164th St., New York 32, New York. Membroj de la Estraro: Armin F. Doneis, Sr., P.O. Box 105, Pharr, Texas. Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Arkansas. Frans J. Jagher, 2736 Locust Dr., Bridgeville, Pennsylvania. James Lieberman, 24 Claflin Rd., Brookline 46, Massachusetts. Paul Nace, 1410 Ray Rd., Hyattsville, Maryland. Catherine Schulze, 410 Darrell Rd., Hillsborough, California. Roan Orloff Stone, 504 N. 5th St., Gallup, New Mexico. Martha Walker, 2846 Monticello Road, Napa, California.

**Fakoj de la Ligo:** Inform-Sekcio, ĉe Thomas A. Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Aŭd-vida Sekcio, ĉe H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. Libro Servo: Esperanto League Book Service, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania. Administracio de la Revuo ĉe Francis Helmuth, 5615 Beaumont Ave., La Jolla (San Diego), California. Financa Komitato ĉe Forrest D. Turner, 215 S. 3rd Ave., Maywood, Illinois. Membreca kaj organiza komitato ĉe Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Arkansas.

**Anoncoj:** korespondanoncojn la Revuo presas senpage. Tarifo por aliaj anoncoj, kaj por reklamoj: \$10 por plena paĝo, \$6 por  $\frac{1}{2}$  paĝo, \$4 por  $\frac{1}{4}$  paĝo, \$2.50 por  $\frac{1}{8}$  paĝo; aŭ 15 cendoj por unukolona linio. Sur la ekstero de la malantaŭa kovrilo, anonco kostas 50% pli.

**Artikolojn kaj Librojn Recenzotajn** sendu al la redaktoro, Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio. Kalkulu 4 tagojn por aera poŝtendo, 6 semajnojn por mara poŝto. Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la redakcion antaŭ la 1a de la antaŭa monato.

## NIA KOVRILO

La denaska esperantistino Lisa Helmuth, La Jolla, California.

Armand Su

# Teo Jung kaj Heroldo


La nomo Teo Jung estas nedisigbla de la tutmonde konata Esperanto-jurnalo **Heroldo de Esperanto** — la plej ofte aperanta kaj la sola jurnalo en nia Esperantujo.

Mi ofte pensas, kvankam iom naive, kiamaniere povis Teo Jung plenumi tiom da laboroj tutsole kaj akurate en la daŭro de pli ol 40 jaroj. Ĉio ĉi postulis de li grandegan energion kaj plenan fidon je la fina triumfo de Esperanto. Jen la antaŭa titolo de lia jurnalo **Esperanto Triumfonta** jam pri lia eterna fido je Esperanto plene atestis.

Mi eĉ kuraĝas diri sen troigo, ke estas neniu serioza esperantisto, kiu ne scias pri la ekzistado de **Heroldo**. Tiu ĉi gazeto estas legata kaj ŝatata ĉie en Esperantujo. Per ĝi ni informiĝas pri la progreso de Esperanto en la tuta mondo, kaj en ĝi ni legas multajn literaturajojn kaj diversajn artikolojn en kaj pri Esperanto, kaj ni vidas bildojn pri la Esperanto-aranĝoj, kunvenoj kaj festoj okazigitaj en la mondo kaj ankaŭ bildojn de niaj plej eminentaj esperantistoj — verkistoj, poetoj, oratoroj ktp., kiujn multaj el ni neniam havis la okazon persone renkonti.

Sed kiom el ni scias pri ĝia fondinto kaj direktoro Teo Jung, pri la historio de lia gazeto, pri la malfacilaj cirkonstancoj, kiuj lin ĉirkaŭis kaj pri la grandegaj laboroj, kiujn li plenumis tiel akurate? Pro tiuj ĉi demandoj multaj el ni ruĝiĝos!

Libroj kaj dokumentuoj, de la planko ĝis la plafono, sidas laŭ tre sistema ordo. Je la momento de mia vizito, pakajoj de la **Taglibro de Anne Frank** preskaŭ barikadis la redaktejon. Granda skribmaŝino; tie Teo Jung maŝinskribas centojn da leteroj. La vicoj de libroj, kiujn Jung mem eldonis, atestas lian alian utilan laboron. Redaktoro, eldonisto, Akademiano, pacienca afablulo, li ja faras sian devon!



Nia eminenta angla poetino Marjorie Boulton, vizitinte lin antaŭ kelkaj jaroj ĉe lia hejmo (kaj ankaŭ la redaktejo de **Heroldo**) en Scheveningen, Nederlando, tiel priskribis. Kaj aliloke ŝi daŭrige priskribis:

Sur la granda redaktora tablo kuŝas ne nur multaj sendotaj pakajoj, sed leteroj, manuskriptoj, libroj por recenzo, salutkartoj, fotoj. Ĉio postulas la atenton de Teo Jung mem, kaj mi povas atesti, ke li respondas al verkistoj tre ĝentile.

(el **The British Esperantist**,  
majo, 1961.)

Teo Jung havas multeflankan talenton. Li estas redaktoro, eldonisto, jurnalista, romanisto, kaj poeto, kvankam li estis plej fama kiel redaktoro de **Heroldo**. Sed ni devas ne preterlasi, ke Teo Jung ankaŭ kontribuis al nia literaturo per sia originala verkado.

Jam en 1926 aperis la unua poemaro de Teo Jung, **La alta kanto de la amo**, kaj en 1935 aperis lia dua poemaro **Ek' al batal'**. Cetere, li eldonis romanon **Landoj de l' fantazio** en 1927 kaj diversajn tradukojn en Esperanto.

Laŭ naskiĝo li estas germano. Sed depost sia translokiĝo al Nederlando, li fariĝis nederlanda civitano. Li naskiĝis en 1892, kaj esperantistiĝis en 1909. Li ankoraŭ ne estis 20 jara. Kun rara kapablo kaj eksterordinara energio li fondis en 1920 la solan Esperanto-jurnalon **Esperanto Triumfonta**, kies specimeno ekvidis la lumon



en aprilo de 1920 en la germana urbo Koln.

Jam komence de 1920 Teo Jung dissendis la prospekton pri sia aperonta gazeto al gesamideanoj en la tuta mondo. Kaj lia alvoko trovis vastan eĥon en Esperantujo. Lia kuraĝa iniciato nin memorigas pri tiu de D-ro L. L. Zamenhof, kiu siatempe en la tre malfacila cirkonstanco eldonis proprakoste la **Unuan Libron** en 1887. Kia simileco, kia kuraĝa imitado!

Sur la unua paĝo de la unua numero de **Esperanto Triumfonta**, sub portreto de D-ro Zamenhof, Jung inaŭguris la naskiĝon de sia gazeto per

la suba poemo:

Frumatene, dum nebul' neklara  
super la tombejo balanciĝas,  
la spirito de la Majstro kara  
nevideble el la polv' eliĝas.  
Tra la landoj iras ĝi, trans marojn,  
venkas jam facile ĉiujn barojn.

Kie iam Esperanta stelo  
varme brilis en fidela koro,  
kie iam por la sankta celo  
sampsensuloj varbis kun fervoro,  
ĉie li ekestas, pord-frapante,  
ĉie la dormantojn revekante.

Ĉu ne vekas vin frapado lia?  
Ĉu vi novan tagon ne sopiras?  
Vidu: paca suno la radia  
post terura nokto supreniras!  
Do vekigu en la tagon karan!  
Bonakceptu vian Majstron karan!

Tiam la gazeto regule aperadis ĉiusemajne. Nur en 1925 ĝia titolo ŝanĝiĝis al la nuna **Heroldo de Esperanto**.

Sed la politika krizo kaj la cirkonstancoj en la tiama Germanio malfavoris la laboron de Teo Jung. Kaj li translokiĝis al Nederlando fine de la 1930oj, kaj daŭrige eldonadis la gazeton, kiu devis ĉesi dum la milito sed post la milito fariĝis duonmonata.

Teo Jung, kiel ĉiu eminenta esperantisto, renkontadis en sia esperantista vivo multajn barojn, eĉ jaluzojn, atakojn, ktp. Sed ĉio ĉi ne senigis de li la fidon je Esperanto. Kiom da fojoj li ĉagreniĝis kaj suferis pro Esperanto! Sed li neniam rezignis pri la nobla laboro, kiu meritas ĉies dankon kaj laŭdon! Esperantujo rekonis lin kaj lin kronis per diversaj titoloj: li estas elektita Akademiano de la Akademio de Esperanto, kaj en 1952 li fariĝis honora membro de UEA. Tio ankaŭ pravas la oficialan rekonon de la plej granda internacia Esperanta organizajo, UEA.

Post preskaŭ duonjarcenta laborado por Esperanto, Teo Jung rajtas postuli iom da ripozo kiel redaktoro, sed kiel privatulo li ankoraŭ daŭre aktivas en nia Movado. Tial ekde 1962 la redaktadon de la multlegata gazeto **Heroldo** entreprenas la juna pola koleginino S-ino Ada Fighiera-Sikorska, lernintino de paĉjo Baghy, kun freŝaj energio kaj talento.

Al la pli juna generacio Teo Jung ĉiam pretas helpi. Iam mi prezentis al li miajn opiniojn pri la poezitradukado, al kio mi dediĉis kaj dediĉas multan tempon. En sia letero de la 8a de februaro, 1962, li ĝentile skribis al mi: "Pri malfacileco, traduki naci-lingvajn poemojn en Esperanton, vi estas prava. Mi mem spertis tion plej multe, kiam mi volis traduki unu el miaj propraj nacilingvaj poemoj. Pri tio vi povas legi en HEROLDO de 16.12.1961." Li sendis al mi don-ace la duonjaran kolekton de **Heroldo** de 1961.

Estis vere grava evento en nia movado, kiam Teo Jung festis sian 70jaran jubileon je la 12a de decem-bro, 1962. Mi tutekore deziras al li, nia talenta redaktoro, verkisto kaj poeto, bonan sanon kaj feliĉan vivon!

Estas la multjara revo de Teo Jung ke estonte **Heroldo** povos aperi kiel la unua ĉiutaga ĵurnalo en Esperanto. Ĉu ni ne revas pri tio?

Senkonscie mi ekmemoras pri la vortoj, kiujn la eminenta bulgara Es-peranto-verkisto, tradukisto kaj aka-demiano Prof. Ivan Krestanov, post la legado de mia artikolo en bulgara Esperanto-murgazeto (en kiu mi skri-bis i.a., ke dank' al liaj Esperanto-tradukoj la bulgara literaturo estas enkondukita en Ĉinuĵon la unuan fojon) skribis al mi la 24an de de-cembro, 1962, el Sofio: "Kiu plenumas sian homan devon, tiu ne faras meriton."

Sed, ĉu ni ne ruĝiĝos, demandante nin mem: "Ĉu ni plenumis nian hom-an devon kompare kun Teo Jung?"

*Korespond -*



*Anoncoj*

#### **Nederlando:**

Nederlanda eks-instruistino (40jara) deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn. Skribu al S-ino B. Venema Vroeghe, Bernhardlaan 154, Arnhem.

#### **Orienteŭropo:**

La Revuo konstante ricevas nom-ojn kaj adresojn de esperantistoj en la komunistaj landoj de Eŭropo. Ni konscias pri la fakto ke Es-peranto estas transpolitika afero, kiel ankaŭ pri la fakto ke politika agado ĉiuspeca utiligas Esperanton. Tamen, por ne tro unuflankigi la liston de korespondadresoj en iu gazetnumero, ni klopodas egaligi la nombron da korespondpetoj el la diversaj mondpartoj. Tio rezultigis grandan nombron da atendantaj orienteŭropaj adresoj. Por ne tro atendi la koncernatajn personojn, ni ĉisube ilin publikigas en grupo.

**Bulgarujo:** Ivan Domiv, Str. Jor. Ljutibrodski 12, Vraca (kursgvid-anto, deziras korespondantojn por siaj diversaj klasanoj, kiuj estas geinstruistoj, agronomoj, k.c.).

**Ĉekoslovakujo:** Libuše Mikuškova, p.p. Koprivnice, Morava (en la 11a

klasjaro, knabino deziras kores-pondi kun samaĝaj personoj.) Val-kovic Stanislav, Sladkovicova ul. 13, Krupina, Slovakio (gimnaziano, skolto; interesiĝas pri poŝtkartoj kaj esperantista leterpapero). Vlas-timil Kočvara, Gogolova 28, Opava (27jara minmaŝina inĝeniero; in-teresigās pri serioza korespondado pri fakaj temoj, turismo, teatro, poŝtkartoj, poŝtmarkoj, speciale kun filatelisto). Alena Josefovic, Bohus-lana ze Svamberka 1, Praha 4 (19 jara knabino).

**Polujo:** Elzbieta Lipiec, Miedzyrzecz Wlkp, Ulica Slowackiego 12 (25jara virino, eko-nomo; interesiĝas pri moderna literaturo, muziko, bildkartoj, poŝt-markoj).

**USSR:** Esperanto-Rondo "Flamo," Krivoj Rog 34, serĉas korespondantojn por siaj membroj. Harri Valjari, Tallinn 9, Saarepuu 9, Estonio (per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj, kaj interŝanĝi fotojn). K. Aleknavicius, Zemaiciu 22, 4, Kaunas C, Litovio (deziras inter-ŝanĝi poŝtkartojn). A. Mekys, Pŝevalskio 10-26, Vilnius 9, Litovio (poŝtkartojn). Elvira Lippe, Vik-torijas 97, Majori, Litovio. Anek-sandr Djemin, Str. Sovetskaja 49, k. 120, Novosibirsk 99, Litovio.



# Nia Mondo Esperanta

**Skoltoj:** La agado de la Skolta Esperantista Ligo nun estas oficiale rekonita kaj aprobita de la Boy Scouts of Canada. Esperanto, kiel aliaj lingvoj, estas lernebla por akiri la skoltan insignon de interpretisto.

En la somero de 1964 okazos en Nederlando Eŭropa Esperanto-Skoltjamboreo. Prepare al tio, artikoloj pri Esperanto kaj pri la Skolta Esperantista Ligo aperadas kaj plu-aperos en skoltgazetoj tra Eŭropo.




Entuziasma Esperanto-grupo organizita per la Virinoj de St. Paul's Episcopala Church en Houston, Texas (Usono). La kurso estas gvidata de D-ro John B. Rushing (dekstre sur la foto).

**Jurnaloj:** Usonaj gazetoj raportintaj pri esperantaj eventoj inkludas la **Springfield, Mass., News**, pri lekcio kaj specimena leciono faritaj de Arland R. Meade en la Monson High School. La **Cambridge Springs, Penn., Enterprise News** presis artikolon kun bildo pri Conrad Fisher, kiu prezentis programon pri Esperanto en la tiea Kiwanis Club. La **Portland, Oregon, Daily Reporter** publikigis artikolon pri Kapt. Henry Milsted, kapitano de la ŝipo Barbara Frietchie, kiu havas "amikojn en ĉiu havenurbo" pro Esperanto. Li unue lernis pri Esperanto en Narvik, Norvegujo, kaj poste studis en klaso de Jim Deer en Portland. La **Harrisburg, Penn., News** anoncis novan kurson instruatan de Wm. Simpson. En la **Willows, Calif., Journal** aperis longa letero de Eugene B. Stephens, kun

granda bildo pri ekspozicio esperanta en la urba biblioteko. Poste, aperis letero de H. E. Dillinger, kaj anonco pri esperanta kurso.

**Kursoj:** En **Houston Texas**, D-ro John B. Rushing instruis kurson en la St. Paul's anglikana preĝejo, kaj instruos duan kurson dum la aŭtuno. En **Portland, Oregon**, Tom Davidson instruis kurson por infanoj de la 5a ĝis 8a klasjaroj. Ensume estis 11 kursoj en Portland. En New Jersey Don Hoffman instruis kursojn, i.a. en la telefona kompanio. La bildo prezentas foton presitan en la inform-gazeto eldonata de tiu kompanio.



Nova kurso komenciĝis en Orange, Mass, instruata de S-ino Dubar; kaj klaso kunvenas ĉe Mahar High School, Orange, Mass., instruata de S-rino Harold Wesson.

## PIKNIKO

La Esperanto-Klubo de Springfield, Mass., okazigos piknikon por ĉiuj New England Esperantistoj, la 20an de julio, ĉe la farmo de Ges-roj Leslie Allen, Belchertown, Mass. Kiu deziras partopreni, bonvolu kontakti S-inon Allen.

# Esperanto kaj la Morsa Kodo

Jam en 1925 la Internacia Telegrafa Unio agnoskis Esperanton kiel "klaran lingvon" kiun oni rajtas uzi en internaciaj telegramoj kaj radiogramoj. Nenio estis tiam dirita pri tio, kiel oni indiku la supersignitajn literojn, kiuj kompreneble ne ekzistas en la radiotelegrafa alfabeto, la t. n. Morsa Kodo.

Sed la bazo de nia lingvo kuŝas en la verko "Fundamento de Esperanto", en kiu Zamenhof difinis al "presejoj, kiuj ne havas la supersignitajn literojn" la alternativon substitui por ĉ la literojn **ch**; por **ĝ**, **gh**; ktp. kaj por **ŭ**, **u**. En la praktiko, Zamenhof mem neniam uzis **ch** ktp. en presajoj sed li **ĉiam** uzis tiun metodon en telegramoj. Oni do povas akcepti el precedenca vidpunkto la oficial-econ de **ch**, **gh**, **u**, ktp. por internaciaj telekomunikoj. Estas substrekende, ke kiam ajn esperantistaj radiistoj — ekzemple radioamatoroj — kontaktas unu la alian per Esperanto, la **sola** laŭleĝa rimedo indiki la supersignitajn estas pere de **h**.

Tio estas ĉar la solaj literoj universale uzablaj, laŭ la reguloj de la Internacia Telekomunika Unio — la koncerna superregistara instanco — estas la 26 bazaj literoj de la okcidentaj alfabetoj:

A - -	N - -
B - - - -	O - - - -
C - - - -	P - - - -
D - - - -	Q - - - -
E - - - -	R - - - -
F - - - -	S - - - -
G - - - -	T - - - -
H - - - -	U - - - -
I - - - -	V - - - -
J - - - -	W - - - -
K - - - -	X - - - -
L - - - -	Y - - - -
M - - - -	Z - - - -

La ITU ankaŭ permesas en esceptaj kazoj — "inter landoj, kiuj permesas ilin" — kelkajn supersignitajn

literojn:

Ā aŭ AE	....
Ă aŭ Ā	....
CH	....
Ñ	....
Ō aŭ Ø	....
Ŭ	....

Notu bone, ke la regulo permesas ĉi tiujn signojn nur inter landoj, kiuj komune uzas ilin; ekzemple en radiogramo de germana al skandinava stacio, oni povus utiligi la signojn (. . . -) kaj (- . . .) ĉar la koncernaj literoj uzigas en **kaj** la sendanta **kaj** la ricevanta landoj. Sed usona stacio en kontakto kun germana **ne** rajtus uzi tiujn literojn, ĉar ili ne estas kutimaj en la lingvo de Usono. Oni do devus sendi por **ā**, **ae**; por **ō**, **oe**; ktp. laŭ la kutimo por la germana lingvo.

Ekzistas aliaj kodoj per kiuj sendi en plej diversaj lingvoj, ekzemple rusa, serbokroata, turka, japana, ktp. Sed denove necesas substreki, ke ĉi tiuj kodoj estas rajtigataj nur por **enlanda** kaj ne por internacia uzo, krom en esceptaj kazoj. La ekzisto, ekzemple, de supersignitaj literoj en la serbokroata, kiuj tre similas la esperantajn, neniel ebligas al ni imiti tiujn signojn en esperantaj sendoj.

Sed la uzo de **ch** ktp., aparte de la fakto, ke esperantistoj simple ne ŝatas tian uzon ĝenerale, estas malkonvena en la radiotelegrafo ĉar ĝi plilongigas la sendaĵojn kaj sekve malrapidigas ilin. Oni bezonas proksimume duoble tiom da tempo por sendi, ekzemple, **shi** ol **si**. Cetere, estus afero tre prestiĝa por Esperanto, el informata vidpunkto, se ni povus indiki la ekziston de apartaj simboloj en la morsa por niaj specialaj literoj.

De tempo al tempo proponoj estas faritaj por la starigo de esperanta morsa kodo, sed ili ĉiuj falas en tri kategoriojn: (a) utiligo de ekzistantaj neesperantaj literoj — **q** por **ĉ**, **w** por

ŭ kaj simile; (b) uzo de aparta "indikilo" por la supersignoj; kaj (c) elpenso de tute novaj simboloj por la ses supersignitaj literoj.

La metodo (a) ŝajnas nekonsilinda, pro ebla konfuzo kiam oni devas sendi nacilingvajn nomojn, kiuj postulas la samajn simbolojn. Metodo (b) vere ne prezentas solvon, ĉar la indikilo ne povus esti pli mallonga nek pli konvena ol la litero **h**. Metodo (c) havas la malavantagon, ke sendepende, artefaritaj signoj estus sen leĝa bazo kaj neuzablaj en la radio sen oficialigo fare de la ITU—tre neverŝajna faro en la baldaŭa tempo.

En 1961 James McMullen, sub-Leŭtenanto en la brita mararmeo, verkis artikolon pri la temo por la revuo **Esperanto** de UEA. Samtempe kaj tute sendepende, mi mem verkis skizon pri la demando por multobligita cirkulero "CQ ESP" kiun mi dissendis al konataj radioamatoroj kaj profesiaj radiistoj. La sekvo estis, ke McMullen kaj mi, kune kun komuna amiko kaj kolego franca, radiisto Henri Chaisnot, formis neformalan komitaton por pristudi la aferon detale kaj prezenti, se eble, solvon. Post multaj leteroj ni ekkredis, ke ekzistas bona bazo por konsekvencaj esperantaj morsaĵaj signoj, kaj ni multe entuzismiĝis pri la projekto.

En 1962, ĉe la Universala Kongreso en Kopenhago, mi parolis kun S-ro Norman Smith, komitatano de UEA pri kulturaj aferoj, kaj priskribis por li la tiaman staton de niaj studoj. Li esprimis grandan intereson pri nia agado, kaj post Kopenhago, kiam lin anstataŭis en la sama posteno D-ro André Albault, ĉi tiu ankaŭ interesiĝis kaj mem ekpartoprenis en niaj diskutoj, kiel reprezentanto de UEA.

Antaŭnelonge nia komitato prezentis sian finan raporton al UEA. En ĝi ni rekomendis la sekvantajn specialajn literojn:

Ĉ . . . . .	Ĵ . . . . .
Ĝ . . . . .	Ŝ . . . . .
Ĥ . . . . .	Ŭ . . . . .

La literoj neniel estis sensisteme nek frivole (certe ne arbitre) elpensitaj, sed havas bonan skemon kun la sekvantaj ecoj:

(A) La literoj estas facile lerneblaj por radiistoj, ĉar ĉiu el ili konsistas el la sama simbolo kiel por la sensupersigna litero, plus la plejeble mallonga aldonita punkto, streko, aŭ streko-punkto. Escepto estas la litero **h**, kies bazo estas ne **h** sed **k**, ĝia plej parenca litero **h** ne liveras uzeblan signon laŭ la skemo).

(B) Tri el la literoj estas pravigebaj per precedencoj. La simbolo por ĉ (- . . . .) estas **c** en pluraj lingvoj. Ĝ (- . . . .) estas **ĝ** en la serbokroata kaj iam estis uzata por **g** malmola en la itala. Ŭ (. . . -) estas **u** en la jam menciita listo de esceptaj oficialaj signoj.

(C) La elektitaj simboloj estas verŝajne la plej mallongaj, kiujn oni povus krei por niaj literoj.

Pro ĝia facila lernebleco, ĝia skemeco (konsekvenceco) kaj la mallongeco de la signoj, ni opinias, ke la prezentita kodo plejeble bone respondas al la praktikaj bezonoj por esperanta morsa kodo.

Restas la demando pri enpraktikigo kaj eventuala oficialigo. Ni proponis al UEA rekomendi la kodon portempe al skoltoj, marsignalistoj k.s., daŭre presi ĝin en la Jarlibro, menciigi ĝian ekziston en taŭgaj informaj dokumentoj ktp. Tiamaniere oni esperas establi la kodon en neoficiala maniero, por ke poste, kiam Esperanto fariĝos pli vaste uzata tra la mondo, jam ekzistos bazo sur kiu povi peti al taŭgaj instancoj formalan oficialan agnoskon.



**Esperantajn poŝtmarkojn vendas al kolektantoj en la regiono de Pasadena la J. W. Robinson Dept. Store, Colorado Blvd., Pasadena.** Ĉu vi enketis ĉe la poŝtmarkvendistoj en via regiono? Kial ne komenci kolekti la esperantajn poŝtmarkojn por vi mem?



# Lernu Ludante

Ludoj en klubo povas helpi lerni novajn vortojn. Ankoraŭ maloftas pretaj esperantaj ludiloj kun instruata celo, sed oni povas facile adapti naciolingvajn ludilojn tiel, ke ili helpas pligrandigi nian vorttrezoron. En tiu ĉi artikolo mi volas klarigi kiel mi faris tion je du bele kaj multkoloraj presitaj lotludoj eldonitaj en Usono.

La unua estas la "Educational and Entertaining game BIRD-O (jes, ĝi fakte havas esperantan nomon!) Series 6 - Songbirds" eldonita de Barton Cotton Inc., Baltimore 13, Md. La ludilo konsistas el 6 ludotabuloj, kiuj surhavas la bildojn kaj nomojn de po 9 diversaj nordamerikaj kantbirdoj. La bildoj de la birdoj ripetigas sur kelkaj tabuloj, sed ne sur ĉiuj, ĉar entute 14 diversaj birdoj estas bildigitaj en tiu ĉi ludilo. Ciu ludanto ricevas unu tian ludotablon. Krome troviĝas en la ludilskatolo 14 etaj kartoj kun la bildoj kaj nomoj de ĉiu unuopa birdo. Tiujn kartojn oni bone miksu kaj metu ilin dorsflankon supre sur la tablon. La unua ludanto prenas unu karton kaj metas ĝin bildon supre sur la tablon samtempe dirante la nomon de la birdo. Nun ĉiuj ludantoj rigardu siajn tabulojn, kaj tiu, kiu plej rapide povas trovi la birdon sur sia tabulo diru: "Mi havas ĝin!" kaj li metu markilon sur la birdobildon sur sia tabulo. Post tio la ludanto maldekstre sidanta prenas alian karton, metas ĝin bildflankon supre sur la tablon, diras la nomon, ktp. Tiu ludanto, kiu unue povas kovri tri birdobildojn en unu vico horizontala, vertikala aŭ diagonala diras "BIRDO" kaj estas la venkinto.

Oni povas facile ŝanĝi la regulojn laŭplaĉe, ekz. ke ĉiu ludanto rajtas meti markilon sur la bildojn de la nomita birdo, aŭ ke tiu venkas, kiu unue kovris la tutan tabulon. La ludo devigas la ludantojn atente rigardi la bildojn kaj encerbigi la nomojn de la birdoj, nekonataj ofte eĉ de spertaj esperantistoj. Sur tabuloj kaj kartoj oni povas facile en-

tajpi la esperantaj nomojn, sed la traduko ne ĉiam estas facila, ĉar temas pri nordamerikaj kantbirdoj, pri kiuj ĝis nun ne ekzistas esperanta literaturo kaj kiuj parte ne estas troveblaj en esperantaj vortaroj. Por faciligi al vi la utiligadon de tiu ĉi ludilo jen miaj tradukoj:

Red-wing	ruĝflugilo
Kirtland's warbler	Kirtland kantbirdo
Mockingbird	mokbirdo
Baltimore oriole	Baltimora oriole
Red-headed woodpecker	ruĝkapa pego



*Turdo*



*Fringelo*

House wren	domparvolo
Barn swallow	stal-hirundo
Song sparrow	kantpasero
Blue jay	blugarolo
Horned lark	kornita alaŭdo
Goldfinch	orkardelo

Sed por la sekvantaj birdoj mi devis krei novajn vortojn, kaj mi opinias, ke estos interese montri, kiel mi faris tion:

"Towhee" — Enciklopedio klarigas, ke la angla nomo devenas de la birdovoko 'to-hi!', pro tio ŝajnis al mi oportune formi simile la novan birdonon 'toĥio'.

"Brown Thrasher" — Denove el enciklopedio mi eksciis, ke "thrasher" estas "iu ajn el kelkaj specoj de mezgrandaj amerikaj kantbirdoj apartenantaj al la genro 'Toxostoma' el la familio de 'Mimidae'." Traduko de "thrasher" estus draŝanto. Aŭdante

ĝin persono ne scianta la anglan lingvon verŝajne ne pensus pri birdo, pro tio mi preferis esperantigi la latinan nomon de la genro: "Bruna toksosotomo."

"Cedar waxwing" — Klarigo en enciklopedio diras: "Waxwing—iu el tri specoj de etaj kantbirdoj, kiuj kune formas la genron 'Bombycilla' de la familio 'Bombycillidae'." Ankaŭ ĉiĵoje mi esperantigis la latinan nomon, ĉar "vaksflugilo" laŭ mi ne bone priskribas tiun birdon. Do mia nova vorto estas: "Cedro-bombicilo."

La dua lotludo de la sama eldonejo kaj ludebla laŭ la samaj reguloj estas "Animal Lotto—Series 7—Wild animals". Ankaŭ por tiu ĉi ludo jen miaj tradukoj:

Gray squirrel	griza sciuro
Whitetail deer	blankvosta cervo
Black bear	nigra urso
Opossum	didelfo
Raccoon	prociono aŭ lavurso
Cottontail rabbit	kotonvosta kuniklo

Marten	mustelo
Chipmunk	striita sciuro aŭ tamiaso
Mink	vizono
Badger	melo
Skunk	mefito
Flying squirrel	fluganta sciuro

Sed ankaŭ je tiu ĉi ludo mi opiniis, ke estis necese enkonduki du novajn vortojn por

Ringtail cat	kakomistlo
Prairie dog	Cinomiso

ĉar zoologie la unua estas nek kato nek la dua hundo. Enciklopedio klarigas ke la pli ĝusta anglalingva vorto por la unua besto estas "Cacomistle", kiu venas de la azteka lingvo, do mi esperantigis tiun vorton kaj por "prairie dog" mi eliris de la latina genra nomo 'Cynomys'. (Se iu scias pli taŭgajn aŭ jam alie enkondukitajn nomojn, bonvolu skribi tion al mi).


RÜDIGER EICHHOLZ.

## Lernu vortoĴZ

- Ĉu porcio estas:
    - kvanto da manĝaĵo donata al persono?
    - nomo de virino en dramo de Shakespeare?
    - speco de vino?
  - Ĉu panelo estas:
    - parto de aŭto, sur kiu estas ciferplatoj, ŝaltiloj, k.c.?
    - ekmalfunkcio de aŭto?
    - korbo en kiu estas pano?
  - Ĉu pneŭmatiko estas:
    - aparato uzata por fosi pavimitan trotuaron?
    - malvarma vento el la oriento?
    - kaŭĉuka bendo kun interna aertubo, por aŭto?
  - Ĉu fiakro estas:
    - granda malsukceso?
    - antikva roma templo?
    - luebla aŭto?
- Respondojn trovu sur paĝo 115.

?

?



# The Esperanto League

for North America, Inc.

808 Stewart St. ■ MEADVILLE, PENNSYLVANIA ■ U. S. A.

Affiliated with Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Holland  
Members in over 80 countries ■ Consultative relations with UNESCO



July, 1963

President's Report to the Annual Congress

By David Richardson

It is a real pleasure to report many gains made for Esperanto in the past year--some of them unprecedented in ELNA's history. First, our membership, which was reported last year at 335, has been increasing at a brisk rate for the past six months and is now approaching the 500 mark. I feel this is excellent news, considering ELNA's membership remained around 300 to 350 during the first ten years of the League.

This growth--better than 33% in a year--is significant proof of the effectiveness of the program I recommended two years ago, designed to build up the League and enable us to work more successfully for Esperanto in North America.

That program consists basically of two simultaneous efforts: to improve the North American Esperanto Review by making it more frequent, more interesting, and better technically; while also carrying on a vigorous drive to attract new members. The program stems from the proven fact, that a good magazine does attract new members.

Much credit must be given Mrs. Dorothy Holland, head of the Membership and Organization Committee, for her systematic, self-sacrificing, and obviously fruitful work in increasing our membership.

Review growing. Members are already aware that we are now publishing nine or ten issues this year, instead of six as before; that improvements continue to be made from issue to issue in the content, cover arrangement, typography and so on; and that as our membership grows--making more funds available--improvements will continue.

Improved administration. Mr. John Futran of New York, who is highly skilled in accounting, was named Treasurer by the Executive Committee to fill out Mr. Jay Berry's term. Improvements have been made in handling routine administrative affairs through the collaboration

of Mr. Futran, Mrs. Holland, and Secretary Conrad Fisher. The chief remaining problem stems from the fact that all officers are unsalaried, and able to spend only their spare time in work for ELNA. With the League growing and the administrative work-load growing too, the only relief for this problem appears to be the eventual hiring of a full- or part-time secretarial assistant. In the meantime our grateful thanks are due Mrs. Holland and Messrs. Fisher and Futran for their countless hours of onerous record-keeping and correspondence, and members' indulgence is appreciated when delays occur.

Youth. In 1963--designated "Youth Year" by the Universal Esperanto Association--ELNA is giving particular support to the excellent youth organization JEN (Young Esperantists of North America), by providing them space in the Review, and especially by maintaining close contacts between leaders of JEN and ELNA in order to coordinate the activities of both groups as much as possible.

New Correspondence Course. We have recently arranged for ELNA to promote the excellent correspondence course offered by the Harvard Esperanto Club. We receive many inquiries for such a course, and in recent years have not been able to supply one.

Progress in the schools. Esperanto was taught during the past year in a number of elementary schools in California, which now has a recommended course of instruction for schools desiring to teach Esperanto. The main significance of these developments, however, is that we can get Esperanto into the schools, if we strive to learn and apply practical procedures for doing so.

Book Service needed. The arrangement which existed between ELNA and the Esperanto Library of Middleton, Wis., whereby the latter sold books in ELNA's name with part of the profit going to ELNA, has been terminated. My recommendation is included in the proposed program, below.

New publicity. There has been increased national publicity on television, radio, and in magazines and newspapers, which has helped to increase awareness of Esperanto; however, much more needs to be done. Our Publicity Committee, under Dr. Thomas Goldman, has prepared a new publicity folder for general use.

Audio-visuals booming. Our Audio-Visual Department, under Mr. H. K. Ver Ploeg, has been building an extensive library of tapes, and making arrangements for slide and film shows in Esperanto, or which promote Esperanto. This service is proving increasingly useful to local clubs.

New recording. I am putting finishing touches on a long-play recording to be produced by a major company. It will contain, in addition to samples of Esperanto spoken by persons from widely

varying parts of the world, a short course in the language, using the modern conversational approach. The recording will be available from record stores throughout the country.

Textbook. My present major project, to be completed later this year, is a new textbook in the popular "pocket book" format, to be sold on all newsstands.

"Hams" organized. With renewed activity among Esperantist radio operators, ELNA member Ed Lindberg, W2CIL, accepted my request that he take over from me the organization of amateur and professional operators throughout the world. This work is going forward and now includes publishing a regular bulletin as well as steps to increase the numbers of radio contacts between Esperanto-speaking "hams" in this country and internationally.

Morse code. I was privileged to serve on the international committee which recommended new Morse code characters for the accented letters in Esperanto (see article elsewhere in this issue). I am also pleased to report a letter I received from the Federal Communications Commission granting official permission for Esperanto-speaking amateurs in this country to use the new characters.

Long-term plans. It is essential that we lay realistic plans for the future, that we have goals--both short-term and long-term--which are attainable, and which will effectively do what ELNA is organized to do: further Esperanto in North America. To vacillate from one program to another, or to have no program at all, would be a fatal mistake. We have laid the groundwork, this past year, for a new, vigorous phase of Esperanto promotion in North America. I urge that the League continue to build a solid foundation which will support a truly effective Esperanto movement in years to come.

Here are some of the things we need to strive for. I assure you, these are fully attainable goals if we will work wholeheartedly to achieve them.

First: A Review which will appear monthly in a format and with such content that the magazine will be a real credit to the Esperanto movement, a magazine we can place in libraries and sell on newsstands across the country.

Second: We must continue to work for a large membership adequate to finance the endeavors of the League, and to give numerical strength to our efforts.

Third: When we have demonstrated that we have the backing of the Esperanto community in this country, and that we are doing as much for ourselves as can possibly be done, we can look for support from one of the large foundations in order to do really large-scale promotional work.

Fourth: As soon as possible, we need to hire secretarial help to handle the routine administrative work in our national headquarters

Fifth: We need to encourage production of first-rate teaching materials, including texts and dictionaries, and encourage training of professional teachers, as the practical way to further the teaching of Esperanto in the schools.

#### Immediate program

To work toward these long-range goals, I recommend the following program for the coming year:

Review: That at least \$1400 be made available from the General Fund for publishing the official organ, plus all contributions made specifically to the Review. This will enable us to publish 11 issues of 20 or 24 pages between August, 1963, and July, 1964, inclusive.

Membership Drive: That this be continued, and in fact stepped up, in order to recruit as many persons as possible into the League.

Book Service: That ELNA set up its own Book Service using as capital part of the reserves now in savings accounts, drawing ordinary bank interest. That Frans Jahger be named to operate this Service and be paid a token commission of 10% of net profits on all sales.

Support of Clubs: That a new committee be formed to cooperate with local clubs in promoting Esperanto effectively, by functioning as a central point for providing materials, information, know-how etc. useful for local promotional activities. The committee's sole purpose would be to help local clubs anywhere in the country to promote Esperanto, along lines discussed in the "Club manual."

Youth and Schools: That wider participation in Esperanto activities by young people be encouraged, by stressing these activities in the Review, by student membership rates, cooperation with JEN, encouraging formation of school Esperanto clubs, and in other ways. The emphasis be given to getting Esperanto into the schools; that an early issue of the Review be devoted to this subject; that a special brochure be drafted, under supervision of professional teachers, to serve as a presentation of the case for Esperanto in U. S. schools.

\*

\*

\*

We are entering a new era in Esperanto promotion. It is no longer true that Americans are unreceptive to Esperanto--one need only look at cities where victories have been won to see that it can be done. The recent growth in ELNA shows we are on the right track. I hope the Congress will agree with this view and authorize the continuation of these advances by approving the program presented above.

I wish to thank sincerely all those who have worked so hard with this past year to bring about the gains that have been reported.

Respectfully,

*David Richardson*



# R E C E N Z O J



**English-Esperanto Dictionary, F. Fulcher & B. Long.**

*Tria eldono, The Esp. Publ. Co. Ltd., 12,5 × 19 cm., 336 p.; prezo: £ 1,- (\$ 1,80).*

Jen nova eldono de la plej bona nuntempe havebla anglaesperanta vortaro. La eldonistoj pligrandigis la libron per proksimume mil novaj vortoj, kaj tradukoj, kaj faris kelkajn malgrandajn ŝanĝojn. La tipografo estas nova kaj multe pli klara ol en la dua ofseta eldono. La nova havas pli da paĝoj ol la malnova eldono kaj certe estos bonvena sur la librobretujo de anglalingvaj samideanoj.

Bedaŭrinde, la eldonistoj ne profitis la okazon por forigo de la ĉefa kritikindajo de la vortaro, la superfluaĵoj neologismoj. Abundas vortoj, kiujn proponis Fulcher kaj Long jam en 1921, sed kiuj neniam trovis akcepton ĉe la esperantistoj (almenaŭ ekster anglalingvaj landoj), aŭ estas nun anstataŭeblaj per pli modernaj, pli ĝenerale uzataj terminoj. Unu ekzemplo: la vortaro donas por **teetotaler** "abstinentulo," kvankam la radiko "abstinent" ne estas konata en Esperanto, dum (kiel montras **Plena Vortaro**) "abstin" estas oficiala, kaj eĉ "abstinenc" estas iam uzita de Zamenhof.

Multaj aliaj formoj kredeble montriĝus utilaj en nia lingvo, sed ĉar ili ne estas ĝenerale konataj, oni riskus esti nekomprenata uzante ilin. Ekzemple, por **bay F.** kaj **L.** donas krom "golfo" la novaĵon "bajo"; kaj ignoras la pli ĝeneralajn "marbrako" kaj "markolo." Por **mentality** ili proponas "mentalo," vorto eble kun meritoj, sed nekonata; pli konvenus, ĉu ne, kunmetita formo kiel "menskapablo" aŭ sim., se oni celas kompreniĝon.

En la malantaŭo de la vortaro troviĝas aparta listo de neologismoj, proponitaj antaŭ 40 jaroj, el kiuj la plej multaj ne enradikiĝis; estus nun pli oportune elimini ilin ol riski konfuzon, precipe ĉe novbakitaj esperantistoj. Se oni devas proponi novajn formojn, kial ne iel signi ilin tiaj, por averti ke temas pri neveste uzataj terminoj?

Kelkaj ekzemploj de ŝanĝoj en ĉi tiu nova eldono: por **innocence** oni aldonis la tradukon "naiveco" kaj sub **innocent** kaj "naiva" kaj "pura." Sub **off** oni forigis la tradukon "dekstra." Sub **offender** estas aldonita krom "krimulo," ankaŭ "kulpulo." Oni ŝanĝis la tradukon por **inopportune** de "malkonvena" al "maloportuna" (kvankam la du estas esence sinonimaj). Do la ŝanĝoj rilatas pli al polurado de la jam ekzistantaj glosoj ol pliriĉigo per tute novaj; kvankam novaj terminoj — precipe teknikaj — ankaŭ enestas.

Nordamerikanoj devas, kompreneble, atenti la multajn **anglajn** formojn kiuj diferencas inter Britujo kaj aliaj anglalingvaj landoj.

Resume: la libro estas nepre havinda kiel referencilo, sed prefere kun samtempa kontrolo per fidindaj esperantaj glosoj (kiel en **Plena Vortaro**).

**Fabeloj de H. C. Andersen, 4a Volumo.** Tr. L. L. Zamenhof. Eld. Heroldo de Esperanto.

Kiel jam atentigis pluraj recenziatoj, la signifo de ĉi tiu libro estas apenaŭ mezurebla por seriozaj studentoj de Esperanto, al kiuj ĝi donas oportunon studi novan stokon da zamenhofaj vortuzoj, parolturnoj,



## JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO

Sendependa organizo aliĝinta al TEJO

# Por Tenadi la Lernanton:

Ĝis nun, granda manko en la antaŭenpuŝo de Esperanto inter la komencantoj estis la foresto de rimedoj per kiuj la Esperanta lernanto eksciis kiel uzi sian akiratan scion, en kaj ekster la kadro de la Esperanta movado. Tre bedaŭrinda estis la ofta perdo de novaj Esperantistoj, kiuj, lerninte la lingvon pere de lerno-libro(j) — izolite — eĉ ne sciis pri la ekzisto de organizoj, revuoj kaj.

Tiun akran problemon kaj multajn aliajn solvas la novaj Komplettoj, kiujn nun disvendas JEN. La Komplettoj (anglalingve "Esperanto Kits") estas cerbido de la Estraro de JEN, kiu jam pasintjare multe diskutadis ĉi tiun problemon de perdado de novuloj el la Movado.

Sed kiel oni intencas tenadi la lernanton per ĉi tiuj Komplettoj?

1. La Komplettoj konsistas el la jenaj eroj: la mondkonata lernolibro **Teach Yourself Esperanto** de Cresswell kaj Hartley; la belega prononcdisko de **Les Editions Francaises**, kun la voĉoj de Flego kaj Peyronnet (45 rpm); la bone verkita kaj kompleta varba libreto eldonita de Ges.Eichholz el Kanado — **Esperanto: Lingvo Internacia** (44 paĝoj); la baza **English-Esperanto Vocabulary** de la Erita Esperantista Asocio; 12-paĝa belega turista faldfolio de Antverpeno, Belgio; lastatempa numero de **Ocidentgermana Revuo**; Internacia Korespondona Demandfolio (UEA) por internaciaj kontaktoj; bela kolora faldfolio de KLM; Librolisto (enhavanta 325 titolojn) de la Libroservo de JEN; aliĝilo por ELNA; aliĝilo por JEN; enkonduka kaj eksplika letero pri la Kompletto.

2. Oni bone povas kompreni ke la komplettoj celas ne nur kapti sed daŭre interesi la Esperantan komencanton, donante al li la okazon tuj

profundiĝi ne nur en Esperanton sed en la Movadon, kun ĉiuj ties avantaĝoj.

3. Sendube alloga estas la aktual-eco de la materialo. Tiu nuntempeco estas psikologie grava, por ke Esperanto impresu kiel laŭmoda, novstila afero. Kelkfoje la ĝis nun uzitaj lerniloj donis vere praan bildon de la mondo kaj la Esperanto-movado! Ni ankoraŭ suferas pro tio. Uzanto de la novaj Komplettoj ricevos pli ĝustan, pli aktualan bildon, surbaze de kiu li povos formi ĝustan opinion pri la lingvo kaj ĝia disvastiĝo.

4. La Kompletto enpakigaŝas en fortan kartonan skatolon kiu bone taŭgas por poŝta distribuo. Por publika disvendado la skatolo sur havas ĉe sia antaŭaĵo modernstilan desegnaĵon kun verda stelo kaj globo. Bele okulfrapa kaj interesprovoka ĝi estas.

Oni ne bezonas multan imagpovon por kompreni la gravecon de ĉi tiu nova entrepreno de JEN. La Kompletto estas bonega varbilo kaj lernilo — je absolute minimuma kosto! Se vi aĉetus ĉiun eron de la Kompletto individue, ĝi kostus al vi \$4.50. Ni, tamen, povas liveri ĝin al vi kontraŭ nur \$4.00! Skribu al ni tuj!

—R.K.

---

1963 estas, laŭ decido de UEA kaj TEJO la **Jaro de la Junularo** en la Esperanto-movado. Dum 1963 faru specialajn klopodojn por helpi la Esperantistan junularon.

Vi povas helpi al JEN:

per membriĝo. (se vi estas malpli ol 30-jara) kontraŭ jarkotizo de \$1.00; per abono de la bulteno de JEN, kiun nemembroj ankaŭ povas ricevi kontraŭ \$1.00; per subtenanta kotizo al JEN (Subtenantoj de JEN pagas \$5.00 kaj ricevas la bultenon regule.)



Vi povas helpi al TEJO:

per kontribuo al ĝia *Fondaĵo Junulara Gazeto* (vidu la majan numeron de la *Revuo* (p. 56); per kontribuo al ĝia ĝenerala kaso; per aĉeto de la nova broŝuro pri TEJO kaj la special-glumarkoj por la Jaro de la Junularo (ambaŭ haveblaj de UEA).

Vi povas helpi al Esperanto: per via helpo al la junularo. Subtenu la estontecon de Esperanto!

---

Ĉi tiun paĝon redaktis por la *Revuo Humphrey Tonkin*. Ĉion por la JEN-redakcio kaj komunikojn pri JEN, sendu al ĝia oficejo ĉe Richard Kollin, 30 Avenue B, New York 9, N.Y.

---

gramatikaj nuancoj, ktp. Tiuj novaj studoj verŝajne ne tre profunde skuos la esperantologian mondon, sed ili certe estos prilumaj en iuj detaloj, kaj ni atendas la rezultojn kun intereso.

Por la ordinara esperantisto mi varme rekomendas ĉi tiun libron por ĝenerala legajo. La rakontoj estas, kiel preskaŭ ĉiu scias, ravaj ne nur por infanoj sed ankaŭ por plenkreskuloj. Danoj ŝatas—oni estas tentata diri "adoras"—ilin en ĉiuj aĝoj. Ĉar Andersen tiel verkis ilin, ke ĉiu fabelo ne nur prezentas simplan rakonton, sed ion subtile profundan, kiu prilumas la vivon, la homan naturon, la ironion de la sorto, aŭ simile. Cetere, ĉiu frazo gutas simplan sed potencon etoson pri la danaj vivo kaj karaktero.

Zamenhof, ne scipovante la danan lingvon, tradukis el germana traduko kiu, bedaŭrinde, havis plurajn mankojn. Tamen la lingvaj genioj de la du grandaj homoj—Andersen kaj Zamenhof—trabrilas sen ĝeno.

**The Life of Zamenhof**, de Edmond Privat. Nova, ofseta, eldono de Esperanto Press, Oakville, Kanado (laŭ arango kun The Esperanto Publishing Co.). \$ 1.25

Kredeble ĉi tiu estas la plej plaĉa

volumo ĝis nun eldonita de la Esperanto Press. La libro estas poŝformata kun fleksebla sed artisme plaĉa kovrilo, kun lerte desegnita bildo pri D-ro Zamenhof. La preso kaj bindo estas tute laŭ profesiaj normoj, pro kio E.P. estas gratulinda.

Temas, kompreneble, pri la anglalingva traduko farita de Ralph Eliott. La nuna volumo estas pliriĉigita per abundaj fotografajoj, ne aperintaj en la pli fruaj eldonoj, kaj mallonga skizo pri Esperanto mem.

Ĉi tiun libron oni aĉetu amase por disdono al amikoj, al lernejoj, al bibliotekoj. Estus ankaŭ interese, meti ĝin prove sur la bretojn de kelkaj komercaj librovendejoj. Tre eble ĝi trovus tie konsiderindan aĉetadon.

—D. B. RICHARDSON.

**Indispensable for the  
Esperanto student**

**SUPPLEMENT TO THE  
ESPERANTO-ENGLISH  
DICTIONARY OF MILLIDGE**

by

Donald Broadribb

(assisted by Paul Nace and

C. D. Capp)

\$.30 from the ELNA Esperanto Book  
Service

## UEA

**Universala Esperanto-Asocio** estas la internacia grupo de kiu nia ELNA estas landasocio. Individuaj personoj povas ankaŭ membriĝi:


membro ricevanta la monatan gazeton Esperanto kaj ankaŭ la **Jarlibron** pagas \$4.50 jare

membro ricevanta nur la **Jarlibron** pagas \$2.25 jare

membro malpli ol 21 jara pagas nur \$2.25 kaj \$1.13 por tiuj du kategorioj de membreco

abono al la gazeto **Esperanto**, sen membreco, kostas \$3.50.

# LIGAJ AĴerojn!



Sendis poŝtmarkojn por la Sekelja fonduso: Frans Jahger (Pittsburgh), B. Engel (N.Y.C.), John Sabin (St. Louis), John Rickey (Sacramento).

**Gazetoj ricevitaj:** El Popola Ĉinio no. 1; The Esperantist Teacher, Feb.; Bulteno (klubo de L.A.), marto; La Verda Lumo (klubo de Washington), marto; SAT-Amikaro, feb.; La Gusta Vojo, feb.-marto; Internacia Journalisto, jul.-sept. 1962; Universala Revuo, marto; British Esperantist, feb.; Brazila Esperantisto, okt.-dec. 1962; Svisa Espero, feb.; De Esperantist, marto; Espero Katolika, feb.; Germana Esperanto-Revuo, feb.; Norvega Esperantisto, no. 1; Homo kaj Kosmo, no. 1; Dansk Esperanto-Blad, jan.-feb.; La Internacia Fervojisto, feb.; Franca Esperantisto, jan.; Sonorilo, dec. 1962; British Esperantist, jan.; Informilo de IEMW, feb.; Heroldo de Esperanto, 1 feb.; Edukado Internacia, jan.; Esperanto (UEA), feb.; Bulgara Esperantisto, nov. 1962.

La supraj gazetoj, kaj aliaj, estas pruntepreneblaj de la oficejo de la sekretario de ELNA.

## BIBLIOTEKOJ BEZONAS VIJN

vin

Ni iam volis aperigi nian **Esperanto-Revuon** en laŭeble plej multaj publikaj bibliotekoj kaj universitataj bibliotekoj, sed postse ni decidis ke nur malgranda parto de la bibliotekoj elstare montras ĝin, tiel ke ĝi perdiĝas en amaso da diversaj teknikaj, komercaj, industriaj, kaj religiaj gazetoj. Neniu volas traserĉi tian amason nur por hazarde trovi ion interesan. Do ni perdis nian bibliotekideon. Tamen, kelkaj bibliotekistoj nun petis ke ni

donu la mankantajn numerojn kaj plusendu la **Revuon** por la bibliotekoj. Do ni petas ke iuj pagis bibliotekajn donac-abonojn bonvolu plupagi por tiuj bibliotekoj kiuj vere volas ilin.

Nun ni entreprenas novan ideon. Glenn Turner, de Middleton, Wisconsin, havas la restantajn ekzemplerojn de la libro de Klukowski **Esperanto for Americans**. Tiu estas dika volumo verkita per arkaika stilo, bazita sur la **Fundamento de Esperanto** kaj ties instrustilo. Kvankam aliaj libroj montriĝas multe pli bonaj kaj efikaj instrulibro, tamen ĝi tre bone taŭgas por speciala celo: S-ro Turner sendas senpage ekzempleron al kiu ajn akceptos donaci ĝin al biblioteko publika aŭ lerneja (t.e. gimnazia, kolegia, universitata, kc.). Antaŭ ol donaci la libron al la biblioteko, nepre skribu vian adreson kaj la adreson de la Ligo interne, por ke legontoj povu kontakti nin. Tiaj donacoj helpos plii kaj librovendejojn kaj membrigojn.

Se vi volas ke S-ro Turner aŭ la sekretario de ELNA sendu la libron en lia aŭ la liga nomo, sendu al ni la adreson de la biblioteko.

Ni faras ĝi tion, ĉar multaj usonanoj vidas pri la "Aggressor" grupo per televido, aŭ vidas artikolojn pri tiu grupo en gazeto, kaj volas scii kie informiĝi pri Esperanto. Komprenoble ili unue pensas pri la biblioteko. Kaj aliaj personoj vidas la libron sur la bretoj, kaj ekzamenos ĝin.

Se ni povos enbibliotekigi priesperantan informon tra la tuta kontinento, ni trovos ke niaj grupoj kreskos multe pli rapide ol nun.

**Resume:** sendu peton por senpaga ekzemplero de **Esperanto for Americans** aŭ al Glenn Turner, Esperanto Library, Middleton, Wisconsin, aŭ al ELNA, 808 Stewart St., Meadville.

Pennsylvania.

La kosto perpoŝte sendi la libron estas proksimume 15 cendoj, do bonvolu sendi tiun sumon, per moneroj aŭ poŝtmarkoj. Se vi preferas ke ni sendu la libron rekte al la biblioteko, sendu ankaŭ la nomon kaj adreson de la biblioteko.

**Tria biblioteka afero:** ni volas vaste enbibliotekigi nian informan numeron de la *Revuo*. Vi povas helpi, sendante al ni 30 cendojn (25 por la numero kaj 5 por la sendo) kun la nomo kaj adreso de la dezirata biblioteko; aŭ, se vi preferas, ni mem elektos la bibliotekon. Sendu al la sekretario de ELNA, ĉe la adreso jam donita.

## KOREKTOJ

Ni estas atentigitaj pri tri eraroj en nia maja numero, kaj deziras ilin korekti. Ĉiuj temas pri UEA:

**Kanada Ĉambro:** la donaco de memblaro por tiu ĉambro estis ekstra donaco de S-ino Henderson, kaj ne parto de la simbola aĉeto de ĉambro. Donacinto de 5000 gld. rajtas nomi ĉambrom en la UEA-domo laŭ sia volo, sed ne provizas meblojn, kutime.

**Jarlibro 1962, Dua Parto:** oni informis, ke UEA elsendis ĝin en decembro, do la poŝto kulpas pri la malfrua transmara ricevo.

**Dua Oficiala Bulteno:** oni celis, ne ke oni ne skribu al la loĝiga servo, sed ne oni ne skribu aparte (t.e. sen la mendilo), por ke la komunikoj kune atingu la servon.

Ni bedaŭras la misajn menciojn en nia maja numero.

## Nova Ludo

**Ĉu vi ŝatus orbitri?** Kartludo, publika de Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado. Prezo: 35 cendoj (5 steloj).

Ĉi tiu estas amuza ludo por grupoj. Mi povas imagi ke en la kadro de festo privata, aŭ tre neformala klub-vespero, aŭ en kurso por progresantoj, ĝi trovus entuziasman akcepton. Por ĝin plejamuzigi, necesas ke ludu

pluraj personoj, eble 6 ĝis 15 aŭ iom pli, kaj ke estu kaj viroj kaj virinoj inter la ludantoj. La metodo de la ludo estas tre simpla: ekzistas du specoj de kartoj, ruĝdorsaj kaj bludorsaj. Sur la ruĝdorsaj kartoj estas demandoj, kaj sur la bludorsaj respondoj. Ludanto prenas ruĝdorsan karton, kaj legas la demandon al alia (prefere aliseksa) ludanto; la dua ludanto legas la respondon de hazarde elektita bludorsa karto. Kiel ĉiam ĉe tiaj ludoj, ofte la kombinoj estas ridigaj, foje pensigaj, kaj kelkfoje havas strangan logikon kiu kaj amuzas kaj pensigas.

Kiel aliaj ludoj preparitaj de la Esperanto-Press, ankaŭ ĉi tiu estas vere havinda.

## ne demandu min

(melodio: "Que Sera, Sera ...")

Kiam mi estis knabino nur,  
Demandis panjon pri la futur';  
Ĉu belaspekta, ĉu riĉa mi,  
Tion respondis ŝi:

Ne demandu min,  
Pri via futur' knabin'  
La sorto ne montras sin,  
Ne demandu min;  
Pri futur' knabin'.

Post kelkaj jaroj demandon ĉi  
Al la fianĉo direktis mi;  
Ĉu feliĉegaj, ĉu gajaj ni,  
Al mi respondis li:  
Ne demandu min ... ktp.

Mia fillino nun al mi jam,  
Faras demandon jen pri la sam';  
Ĉu belaspekta, ĉu riĉa ŝi,  
Kaj nun respondas mi:  
Ne demandu min ... ktp.

Tr. Elsbeth Wielgus

Donald Broadribb

## INSTRUANTE ESPERANTON

Plejofte la instruanto de Esperanto ne estas profesia instruisto. Kaj eĉ kiam profesia, ne estas profesia instruisto de lingvoj. Ankaŭ ofte la instruanto de Esperanto mem estas nur iom pli ol komencanto, kaj ne havas sperton pri la lingvo. Tial, estas grave provizi al niaj instruantoj, same kiel instruantoj en preĝejoj dimanĉlernejoj, helpon. Eble dum iu estonta kongreso eblus prezenti seminaron tiucelan. Ĝis tiam, jen kelkaj punktoj el mia propra sperto. Volonte opiniojn de aliaj personoj mi ankaŭ legus en ĉi tiuj kolonoj.

Antaŭ la komenco de la kurso: kiam la studentoj jam enskribis sin, kaj pagis, dediĉu la unuan horon de la kurso al ĝenerala informado. Disdonu la librojn, kaj ilin trafolumu, eksplikante la ĝeneralan formaton de la lecionoj. Ekspliku pri la klasoj mem: kiom longe ili daŭros, kiom ofte ili okazos, kc. Diru kelkajn informojn pri Esperanto: ĝiaj historio, movado, celoj. Respondu demandojn.

Nepre havu la plenan nomon kaj adreson de ĉiu en la kurso. Ne permesu ke iu eniru la kurson, ne jam paginte. Kaj ne permesu ke iu eniru la kurson post la dua leciono.

Estas tre grave, ke vi klare informu la studentojn pri kiel studi, kaj kiom studi. Emfazu ke ili devas anticipi almenaŭ unu horon da studado ĉiutage, ekster la klaso, kaj ke se ili fidele studos kaj praktikados, probable post unu jaro ili kapablos uzadi la lingvon — heziteme kaj kun eraroj, tamen vere. Niaj varbiloj kutime tiom misprezentas la lingvon, ke studentoj imagas ke post kvar aŭ kvin semajnoj ili jam scios la lingvon. Pro tio, ili amase forlasis la kursojn, kiam ili ekkonscias pri la malfacilaĵoj. Evitu tion jam de la komenco, per klara informado.

Menciu praktikajn metodojn por studi ĉar nur la plej lerta kaj sperta studento kapablas ilin inventi por si. Emfazu la gravecon, ke ĉiu studhoru estu voĉa, kaj ne silenta. Sugestu ke la klasanoj arangu inter si, se eble, du aŭ triope studi kelkfoje dum la

semajno. Provizu magnetofonon, kiun ili povos uzadi.

Planu ke post kelkaj semajnoj, ĉiu studgrupo elektos dramon, kaj ĝin parkere lernos por prezento je la fino de la kurso. Ne simplan unuaktan dramon, sed veran dramon, ekz. **Topaze, Songe Sub Pomarbo, Otel**, kc. Tia parkera lerno de konversacioj en la kadro de longa teksto estas la plej efika maniero por lerni paroli senhezite kaj kun kompreno.

2. Libroj: plej gravas la instruanto. Bona instruanto eĉ kun malbona libro estas sukcesa, sed la inverso ne veras. Tamen, bona instruanto kun bona libro estas ideala celo. El la aktuale akireblaj lernolibroj, **Step by Step in Esperanto, Teach Yourself Esperanto**, kaj **Esperanto, the World Interlanguage** ĉiuj bone taŭgas. La aliajn (ekz. **Essential Esperanto, The Esperanto Teacher, Privilegia Vojo**, kc.) mi malrekomendas, ĉar ili estas nek pedagogie bone faritaj, nek prezentas sufiĉajn detalojn por klasa uzado.

Negrave kiun libron vi uzos, legu ĝin plene kaj detale antaŭ ol komenci instrui la kurson. Komprenu la metodon de la aŭtoro, kaj 100%e vin adaptu al ĝi. Ne planu ĝin uzi "parte" aŭ "principe." Se vi ne intencas fidele sekvi la lernolibron, tute ne uzu ĝin. Pli bone nenion, ol "parte" uzatan.

Ĉiu lernanto devas havi, krom la lernolibron, ankaŭ ekzemplerojn de **Edinburgh Pocket Dictionary** (Millidge kaj Fulcher-and-Long jam estas tiel antikvaj, ke ili ne plu valoras), de **Plena Vortaro**, de la legolibro se tion oni uzos (**Fundamenta Krestomatio**, pro sia abunde varia enhavo, estas taŭga; sed ankaŭ aliaj uzindas), kaj de la dramo por kies prezento li poste laboros.

Krome, ĉiu lernanto devas ricevi abone la **Nord-Amerikan Esperanto-Revuon** kaj unu internacian gazeton. (Mi rekomendas **Norda Prismo, Esperanto**, aŭ **Heroldo de Esperanto**. Sed se la klaso havas unu komunan intereson, ekz. estas ĉiuj religiuloj, skoltoj, kc., do faggazeto pli taŭgas.) Gravus ke ĉiu en la kurso ricevu la samajn gazetojn — kaj abone.

Plej bone estas ke la kursano porpagu ĉion ĉi kun la kurskotizo je la komenco. La instruanto disdonu la librojn dum la unua kunveno, kaj aranĝu la abonojn. La suma kosto estos do ĉirkaŭ \$15.00. Neniun seriozan studenton tiu sumo fortimigos. Sed oni certigu al la studentoj — kaj nepre mem memoru! — ke neniun centdon pli oni petos dum la jaro.

3. La klasoj: Antaŭ la klaso, la instruanto devas zorge prepari ĉiujn detalojn. Planu ĉiun demandon kiun vi faros, ĉiujn detalojn de ludoj, kc. Dividu la horon pli-malpli precize, por ke vi sciu kion fari je ĉiu parto.

En la klaso estas grave variigi la enhavon de la leciono. Infanoj bezonas ŝanĝon de la ritmo de la klaso post preskaŭ ĉiu kvina minuto. Sed ankaŭ plenkreskulo, speciale lernante novan lingvon, facile enuiĝas. Maksimume 15 minutojn, kaj prefere nur 10, dediĉu al unu speco de prezentado. Post la 10-15 minutoj, ŝanĝu la prezenton. T.e., ne plu faru demandojn, sed komencu kantojn, aŭ simile.

En malefika klaso, la instruanto parolas konstante. En efika klaso, la lernanto parolas kiel eble plej ofte. Atentu du gravajn aferojn: la lernanto bezonas mem uzadi la lingvon multe, kaj, la lernanto bezonas renkonti laŭeble ĉiam nur korektajn formojn de la lingvo. Evitu la anglan lingvon. Tio tamen ne signifas ke vi ne rajtas ĝin uzi. Kelkaj lernantoj kapablas studi laŭ la "rekta metodo," sed aliaj, inter ili mi mem, nur plene konfuziĝas. Konsciu ke kelkaj personoj lernas plej bone per siaj okuloj, kaj aliaj per siaj oreloj. Vi devas efike instruadi al ambaŭ specoj. Ĉion novan (ĉu vorton, ĉu gramatikajon) skribu sur la nigran tabulon, kaj ankaŭ diru voĉe. Prezentu novaĵojn angle, sed donu multajn ekzemplojn en Esperanto, kaj post la prezento ne plu uzu la anglan lingvon. Tuj praktikadu la novaĵojn per demandoj, respondoj, kc.

Ĉi tiuj punktoj grave rolu en la klaslecionoj:

1. Prezento de novaj aferoj (vortoj, gramatikajoj) — neniam pli ol 10 minutojn uzu por novaĵoj, en unu klaso.

2. Demandoj kaj respondoj. Ofte komencu la klason per tio. Demandu al la studentoj, almenaŭ unu demandon al ĉiu el ili, zorgante ke kaj la demando kaj la respondo uzas nur vortojn kaj gramatikon jam lernitajn. Faru ĉi tion ofte dum la klaso. Estu sprita. Demandoj ofte estu amuzaj. (Ekz.: demandu al edzo, "Ĉu vi havas katon en via domo?" Eble li respondas, ke ne. Poste, demandu al lia edzino: "kaj ĉu vi havas katon en via domo?" La klaso ridos — kaj ĉi praktikas la lingvon.)
3. Ludoj. (Ekz. "spell down" ne per literumado, sed per provo de vorto-scio; "20 Questions" = "Animal, Vegetable, or Mineral").
4. Nigra-Tabula-laboro. Lernanto iru al la tabulo, kaj faru desegnaĵojn, aŭ skribu vortojn, laŭ esperantlingva ordono de la instruanto.
5. Diktado. Diktu paragrafon, prefere el libro kiun ĉiu havas, esperante. La lernantoj ĝin skribu esperante. Poste ĉiu korektu la skribajon de alia lernanto, kontrolante ĝian korektecon per la libro. Varianto: diktinte la paragrafon, faru demandojn en Esperanto, kiujn la lernantoj povos respondi per la enhavo de la paragrafo.
6. Libera verkado. Iam ajn post la tria aŭ kvara leciono, la lernantoj povos dum eble 15 minutoj libere verkadi ion kaj ĝin prezenti al la instruanto por posta korektado.
7. Konversacio inter la lernantoj.
8. Legado voĉa. (Sed nur de io jam studita.)
9. Kantoj. Ĉiu havu antaŭ si la vortojn kaj muzikon.

Kelkaj principoj estas:

Emfazu, eĉ insistu, ke neniu uzu vorton aŭ gramatikan formon ne jam lernitan. Lernanto ne klopodu diri ion, kion li ne scias diri.

Neniam permesu tradukadon.

Kuraĝigu lernanton, kiu volas ekstre studi.

Se iu lernanto rimarkinde ne povas progresi tiel rapide kiel la aliaj en la klaso, aparte helpu ekster la klaso. Sed ne tro dediĉu tempon al tiu unu persono en la klaso, malfavore al la aliaj.

Fojfoje (eĉ regule, se oni volas; sed ne nepre) en siaj studhoroj la lernantoj preparu skriban ekzercon, aŭ verketon, kaj ĝin donu al la instruanto por korektado.

Ekzamen(et)oj valoras, se ili ne okazas tre ofte.

Je la fino de la klaso klare informu al la lernantoj kion ili devos studi antaŭ la venonta klaso.

Lingvolernado konsistas 85%e el ripetado kaj praktikado, kaj 15%e el lerno de novaj vortoj kaj formoj. Do por ĉiu minuto da prezento de io nova, lasu almenaŭ kvin minutojn por praktikado de la jam lernitaj aferoj.

4. Ekster kaj post la kurso: je eble ĉiu kvara leciono, mallongigu la lecionon kaj prezentu duonan horon da informado pri la historio kaj movado esperantaj.

Ekskursoj, bankedoj, festoj, -kc. plaĉas al iuj studentoj, kaj ilin helpas; sed al aliaj ne. Do se vi ilin planas, ili estu eksterkursaj, kaj nedevigaj.

Same, al kelkaj personoj kluba movado, verdaj steloj, flagoj, "himoj", Zamenhof-festoj, kc. kc. emocie rolas kaj valoras. Sed al aliaj ili nur mortigas la spiriton. Ilin evitu en la klasoj.

Memoru ke mondpaco, amo inter ĉiuj homoj, politika liberalismo, vegetarismo, mondfederalismo, aŭ ceteraĵoj, eble estas parto de via propra celaro, sed ili ne estas ĉies celo. Ankaŭ ili ne rajtas roli en Esperanto-kurso.

Post unujara kurso, la studentoj devos esti kapablaj mem plu progresadi en la lingvo. Progresiga kurso estos dezirinda por kelkaj, sed multaj ne volos ĝin kaj pli bone progresos sen ĝi. Do disponigu tian kurson, sed ne insistu pri ĝi.

Tio signifas, ke dum la jaro vi, la instruanto, devas sufiĉe informadi la

lernantojn pri la esperanta movado, por ke ili povu mem trovi sian vojon en ĝi sen kluba helpo. La Esperantomovado bezonas klubojn kaj asociojn kaj organizitan agadon por povi ekzisti kaj kreski. Tamen, nia idealo estas ke la lingvo estu ĉie uzata, tiel ke tia organiziteco ne estos necesa aŭ dezirinda. Eduku viajn klasanojn mem uzadi Esperanton sen bezono apogi sin sur organizoj.

**The International Language Review**, kvaronjara gazeto. Redaktoro: Floyd Hardin, P.O. Box 393, Denver 1, Colorado, Usono. Jarabono: \$2.50.

Kvankam jam malnova, bone establita gazeto, ĉi tiu eldonajo meritas specialan mencion en la recenzloko pro la lastatempa Simpozio pri Esperanto kiel Monda Lingvo en ĝiaj paĝoj. Granda parto de tri numeroj (ĉiu numero enhavas pli ol cent paĝojn) estas dediĉita al libera diskutado de la temo. Du partoj de la simpozio jam aperis, la tria estas baldaŭ aperonta.

Komencis la simpozion represo de artikolo de Ivo Lapenna, aperinta originale en la UEA-gazeto **Esperanto**. En la dua parto de la simpozio aperis longa, dua artikolo de Lapenna, speciale verkita por la simpozio, artikolo de nia redaktoro, kaj de aliaj. Ĉar temas pri vera simpozio, esperantistoj kaj neesperantistoj, favorantoj kaj malfavorantoj, partoprenas. Post la kompletigo de la trinmera diskuto, simpozio simila pri la angla lingvo kiel monda lingvo sekvos.

**The International Language Review** estas ĝenerala gazeto pri mondlingvaj temoj, dediĉita al neniu specifa projekto aŭ vidpunkto. Sur ĝiaj paĝoj ofte aperas valoraj interlingvistikaj artikoloj kaj diskutoj. Ĝis 1962, via redaktoro regule kontribuis bibliografian sektion, kaj plu aperas en ĝi per artikoloj. Al kiu interesiĝas pri lingvaj diskutoj, studoj, kaj konsideroj, ni rekomendas ĉi tiun seriozan kaj altkvalitan gazeton.

## VIAN MANUSKRIPTON

ne lasu en la ŝranko, sed proponu al la Revuo. Eble ĝi estos presata.

# ESPERANTO

---

# GROUPS

---

in the U.S.A.

Listed by State, City, and name of person to be contacted for further information:

## California:

Hillsborough: Peninsula Esperanto Club (Mrs. Wm. Schulze, 410 Darrell Road).

Los Angeles: Esperanto-Klubo de Los Angeles (Wm. W. Glenny, 2705 Carlaris Road, San Marino).

Napa: Napa Esperanto Club (Mrs. D. C. Walker, 2846 Monticello Road).

Palo Alto: Esperanto in Palo Alto (P.O. Box 11564, Station A).

Sacramento: Esperanto Society of Sacramento (Mrs. Florence Curtis, 5101 Stockton Blvd., Sacramento 20).

San Diego: Esperanto Society of San Diego (Frances E. Helmuth, 5615 Beaumont Avenue, La Jolla (San Diego)).

San Francisco: Esperanto-Societo de San Francisco (SSgt. Barbara D. Colt, 580C Lendrum Road, Presidio of San Francisco).

San Gabriel Valley: Blind Study Group (Mrs. Phillips Neuman, 2736 Cogswell Road, El Monte).

Santa Monica: (Mrs. Blanche Parker, 515 25th Street.)

## Illinois:

Chicago: Esperanto Society of Chicago (Mrs. J. N. Denison, 17958 Homewood Ave., Homewood).

## Massachusetts:

Cambridge: Harvard Esperanto Club (Quincey House, Box 8, Cambridge 38).

Springfield: Greater Springfield Esperanto Club (Warren H. Gould, 114 Deerfield Street, Greenfield).

## Michigan:

Ann Arbor: (Wm. C. Dickerman, 424 Hilldale).

## Missouri:

St. Louis: Esperanto Societo de St. Louis (John Sabin, 9 Princeton Place, University City 30).

## Montana:

Missoula: Esperanto Study Group (Bob Davis, 1721 Helen).

## New York:

New York: The Esperanto Society of Greater New York (50 Overlook Terrace, New York 33).

New York: Esperanto-Klubo de Novjorkurbo (Dr. Julius Balbin, 340 Riverside Drive, Penthouse 2, New York 25).

New York: Esperanto Study Group (Frances Leshner, 4 West 28th Street, New York 1).

## Oregon:

Corvallis: Oregon State University Esperanto Group (Jean Ann Troutd, 507 West Hall, OSU).

Oregon City: Oregon City Esperanto Group (Mrs. Lawrence Winkleman, 4203 S.E. Rothe Road, Milwaukie 22).

Portland: Esperanto-Societo de Portland (ESPO). (Mrs. Evelyn Deer, 12946 N.E. Hancock St., Portland 30).

Portland: Multnomah Esperanto - Stud - Grupo (Tomaso Davidson, 3434 S.W. Marigold St., Portland 19).

## Pennsylvania:

Allentown-Bethlehem: Esperanto Club of the Lehigh Valley (Donald Munro, 1961 Erie Ave., Quakertown).

Meadville: Meadville Esperanto Society (Barbara Eberhardt, 681 Hickory St.).

Pittsburgh: Esperanto-Klubo de Pitsburgo (Donald H. McClellan, 333 Macassar Drive, Pittsburgh 36. Phone: (412) 655-7704).

Tri-Stata Esperanto-Informejo and Tri-Stata Esperanto-Bulteno (2736 Locust Drive, Bridgeville).

## Texas:

Houston: Esperanto-Klubo de Houston (Edward F. Lacy III, 6923 Schley St., Houston 17. Telefono: WA-6-5702).

## Washington:

Seattle: (Vincent Griffeth, 8556 37th Ave., S.W.).

Spokane: (H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave.).

Tacoma: (Ruth Culberg, 1912 N. Monroe).

Walla Walla: Montvida Esperanto Society (Al Estling, 1351 Grant St.).

## National Groups:

Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

Junularo Esperantista de Nord-Ameriko (JEN) (Richard B. Kollin, Apt. 4a, 30 Avenue B., New York 9).

## Book Dealers:

Esperanto League Book Service, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

Shorey Book Store, 815 Third Ave., Seattle 4, Washington.

Esperanta Libroservo, 6361 Elmburst Rd., San Diego 20, California.

Esperanto-Library, Middleton, Wisconsin.

All the book dealers accept mail orders.

Se la supraj adresoj aŭ nomoj ne estas ĝustaj, aŭ se ekzistas aliaj grupoj, bonvolu informi:

S-ino Dorothy Holland (Estro de la ELNA Membrea kaj Organiza Komitato),  
1976 Greenvview Drive,  
Fayetteville, Arkansas.

## Respondoj por "Lernu Vortojn"

1. a
2. a
3. c
4. c

Ĉiu vorto estas oficiala. La ĝustaj difinoj estas bazitaj sur la difinoj en P.V. aŭ en la O.A. de la Akademio. Se vi erare respondis al pli ol 1, vi grave bezonas pligrandigi vian vortoscion.

La lasta manuskripto de  
D-ro Zamenhof  
„FABELOJ” de H.C. ANDERSEN  
(kvara volumo)



240 paĝoj kun dukolora polvokovrilo

53 originalaj ilustraĵoj de

A. Uniechowski

Eldonis :

Heroldo de Esperanto

13 rue de la Reinette (Pijpelingstraat)

Bruselo 1

Prezo: 3,30 usonaj dolaroj

Mendu ĉe „Heroldo de Esperanto”

aŭ ĉe via Landa Esperanto-Asocio.

---

## DE ALASKO AL MEKSIKIO:

La gazeto por ĉiuj esperantistoj sur la nord-amerika kontinento estas

## LA NORD-AMERIKA ESPERANTO-REVUO

Jarabono: \$3 (40 steloj)

Abonu ĉe ELNA

aŭ via landa asocio

---

Esperanto League for North America  
808 Stewart St., Meadville, Pa.